

# INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

---

## IPR

Organo de Internacia Ligo  
de Esperantistaj Instruistoj

ILEI

---

Jarkolekto 13

N-ro 2, 1983

Presado: Offset Massarosa, Tel. (0584) 93.090

Kompostado: Grafika Centro de Universala Esperanto-Asocio, Antverpeno

## Enhavo

1. Etnaj lingvoj en Eŭropo kaj Esperanto IPR-raporto
2. Rajdado kun blinduloj kaj malfortvidantoj Stern, Germanujo
3. Internacia Lernejo en 1987 IPR-raporto
4. Modernigita lernejo postulas ankaŭ novan instruiston J. Marević, Jugoslavio
5. Fakultativa Fremdlingva Instruado en Bulgario M. Bacev, Bulgario
6. 9-a Internacia Printempa Semajno en Grésillon, 3-a ĝis 9-a de Aprilo F. Le Magadure, Francujo

La 17-a konferenco de ILEI okazis ĉi-jare en Sintra/Portugalujo de la 14-a ĝis la 22-a de julio. Partoprenis ĝin 62 Ilei-anoj kaj gastoj el 14 landoj, nome Italio, Germanujo, Svedujo, Bulgarujo, Francujo, Hungarujo, Portugalujo, Hispanujo, Britujo, Jugoslavujo, Usono, Brazilo kaj Sud-Koreujo.

Certe ILEI-konferenco ne estas UEA-kongreso nek laŭ impona nombro nek laŭ kataloga prezentado de programeroj. Nek vi renkontos famajn universitatajn profesorojn, nek la kremon de la esperantista socio kaj pluraj preferas – se oni jam devas elspezi multe da mono – esti inter la miloj vizitantaj UEA-kongreson.

Kaj fakte ILEI-konferenco estas tiel komparebla kun granda kongreso kiel muso kun elefanto.

Sed kiu ŝatas esti for kaj transe de tro grandaj amasoj, kiu preferas la senperan proksimecon inter samideanaj homoj, kiu serĉas amikajn konversaciojn, kiu deziras aktive partopreni diskutrodojn, mem paroli kaj ne nur konstante aŭskulti, kiu amas kunlabori..., ĉiuj tiuj volonte vizitas la konferencojn de ILEI. ILEI-konferencoj estas unikaj kaj neimiteblaj – sed ĉio dependas de la atendoj kaj pretendoj de la unuopaj homoj.

ILEI ofte konferencas en malgrandaj landoj, kiuj ofte situas tiel periferie, tiel ke por multaj ekestas longaj distancoj.

Ni Esperantistoj, nepre evitu krei t.n. Mekko-jn ni prezentu nian internaciecon per vizitado en ĉiam novaj landoj.

Niaj membroj en Malagasio, Sud-Afriko, en Sud-Koreujo aŭ aliaj aziaj landoj, en Usono aŭ Aŭstralio, en Sud-Ameriko tre ĝojus se ili ne daŭre estas invitataj viziti iun landon en Eŭropo.

Portugalujo apartenas al la flanko de Eŭropo kaj montriĝis ke niaj tieaj samideanoj bezonis la moralan apogon kaj solidarecon de nia Ligo.

Pro tio bedaŭris kaj eĉ kritikis unu konferencano la malmultan nombron de la ĉeestantoj.

Se temas pri la nombro de la portugalaj Esperantistoj praviĝas la eldiro.

Partoprenis nur naŭ Portugaloj. Ofte la homoj pro inertece maltrafas sian ŝancon.

Portugalujo estas impona laŭ historiaj, kulturaj kaj pejzaĝaj vidpunktoj kaj kiu vizitas la multajn kulturajn atestantojn renkontiĝas kun la spirito de longa historia epoko.

Sintra proksime de Lisbono apartenas al tiu Epoko kaj estis la loko de nia konferenco. Por la unua fojo en la miljara historio sonis la Internacia Lingvo en la urbo.

La hotelo Tivoli servis al ni kiel konferencejo. Ĝiaj elegantaj salonoj, ĝiaj bone ekipitaj konferencaj ĉambroj donis al la Internacia Lingvo tiun kadron en kiu ĝi pli bone povis montri sian signifon.

La programo montriĝis sufiĉe klara kaj varia. Porinforme jen kelkaj statistikaj skizoj:

– Inaŭguro en bela palaco: partoprenis la urbestro, kelkaj reprezentantoj de diversaj urbaj officejoj;

14 reprezentantoj de niaj landaj sekcioj salutis per kelkaj frazoj la konferencan, por UEA parolis sinjorino E. Lapenna.

La urbestro bonvenigis ĉiujn konferencanojn kaj substrekis la valoron de Esperanto, post la inaŭguro li regaligis ĉiujn per vino kaj manĝetaĵoj.

– Krom la inaŭgura parolado „Etnaj Lingvoj en Eŭropo” efektiviĝis jenaj preleĝoj dum la konferenco:

La Laponoj

Enkonduko en la pedagogion de Freinet

Esence propraj kvalitoj de Esperanto en komparo kun etnaj lingvoj

Pri la lerneja sistemo en Portugalujo

Esperanto-trenado en Sud-Koreujo

Pri la origino de la Portugala lingvo

– almenaŭ kvar lingvaj seminarioj por komencantoj kaj „maturaj parolantoj”,

– unusemajna seminario pri la „Diroj de Mateo” de Freinet

– unusemajna kurseto pri „Nova Skribo”

– artmuzika vespero sur la ŝtuparo de la reĝa palaco. Infana grupo kantis multajn kanzonojn kaj ĝi ravis ĉiujn kiam ĝi plurfoje prezentis la himnon antaŭ la pitoreska nokta silueto de la urbo.

– kvar ekskursoj gvidis la konferencanojn al pluraj kulturriĉaj kaj historiaj lokoj kaj urboj.

– la estraro kunvenis kvinfoje.

Vendrede, la 22-an la konferencanoj disiris kaj espereble denove kunvenos venontjare en Jugoslavio.

## Rajdado kun blinduloj kaj malfortvidantoj

Ellnor Stern

Rilate la temon al mi proponitan ”Rajdado kun blinduloj kaj malfortvidantoj” mi troviĝas jam en la kampo de la sporto de la handikapuloj.

Al tiu temo jen kelkaj antaŭrimarkoj:

Blindeco kaj malforta vidkapablo povas trafi sporte talentitan kaj tre inteligentan homon, samkiel ankaŭ mense aŭ korpe handikapitan. Pro tio eblas trovi viddifektitajn infanojn kaj junulinojn, kaj en la rajdadterapio kaj en la sanigpedagogia rajdado aŭ volteado. Rilate tion validas kompreneble esence ĉio, kion mi traktis pri la evoluo de la moviĝkapablo de la blinda infano kaj la laboro je la longo.

Ĉar la blindeco estas la pli grava handikapo, mi ĉefe traktos tion kaj pritraktos la viddifektitajn rajdantojn nur en la kazo, se nek la metodiko por vidantoj nek por blindaj rajdantoj estos aplikebla. En ĉi tiu kazo la vorto blindeco ne signifas „Visus = 0”. Mi akceptas la difinon al ĉiuj kompreneblan, kiu klarigas: „blinda en la senco de la leĝo estas ĉiu, kiu ne kapablas orientiĝi en fremda medio sen fremda helpo.”

Malgraŭ tia limigo la temo enhavas tiom da materialo, ke mi povas trakti, en mallonga tempo, aŭ ĉion supraĵe aŭ profundigi aparte nur kelkajn gravajn punktojn. Mi decidis favore al la dua ebleco.

Mi pritraktos la temon en kvar ĉapitroj:

1. Antaŭkondiĉoj de la blinda rajdanto sub la aparta konsidero de la evoluo de la moviĝkapablo dum la infanaĝo.
2. Instruo je la longo por komencantoj, precipaj postuloj je la longo-ĉevalo.
3. Rajdado en la halo kaj en la pejzaĝo.
4. Problemoj kaj eblecoj de la integriĝo.

### 1. Antaŭkondiĉoj de la blinda rajdanto sub la aparta konsidero de la evoluo de la moviĝkapablo dum la infanaĝo.

La moviĝado estas prafunkcio de la vivo, kaj nur el la moviĝado evoluas mensa funkcio kaj mensa klareco. Ne hazarde en nia lingvo la vorto „kom-preni” sence alproksimiĝas je fizika movo kaj mensa kapableco! La manko de la vidkapablo ĉe la infano havas ĝuste ĉi-tie tiel profundajn negativajn konsekvencojn je la evoluo de la

movkapablo, ĉar la akustika ekscito – alie ol la optika – bedaŭrinde ne gvidas al celitaj palpomovoj.

Sen la celita moviĝtrejnado, kiu devas komenci jam dum suĉinfanaĝo, ĉe la blinda infano la mova debileco ĉiam pli kreskus kun la malevoluo de la spirito kaj eblaj mis-evoluoj de la personeca strukturo. La gvidata infano lernas tieldirite ludante kaj de si mem – ekscitita de optikaj impresoj. Por la blinda infano la eklernado de ĉiu unuopa moviĝo signifas ĉiam streĉan lernadon. Tiel okazas ĉiam denove, ke la motora korpa funkciado estas false programita kaŭze de malkorekta lernado de la movoj, ke ekestas alkutimiĝo je falsaj kaj nekompletaj moviĝmodeloj kaj manko de movkoordinado. Ni luktadas en la tuta antaŭlerneja kaj lerneja kampo – precipe en la sportinstruado – pene kaj kun senfina pacienco kontraŭ tiaj erare aplikataj moviĝmodeloj. Tiuj luktoj estas tiel malfacilaj, ĉar mankas la eblecoj de la optika kontrolo, kaj la infano devas palpfermi de si mem la ĝustajn movojn, kio ofte nun malkomplete sukcesas. Krom tio la ebleco de libera kaj spontana moviĝado en pli grandaj rapidecoj estas preskaŭ neekzistanta. Ankaŭ se la infano ekzemple lernis kuri tra la loĝejoj aŭ laŭlonge de la ĝardenovoj, ĉar la familio ĉiam zorgas pri la sama pozicio de la mebloj kaj la ĝardenovoj estas tiel aranĝitaj, ke la piedoj facile eksentas la direktoŝanĝojn § unufoje forgesita rastilo transverse la vojeton, unufoje forlasita polvosuĉilo en la loĝĉambro, ĉar io sonis je la pordo, kaj la infano neniam plu reakiros la perditan memfidon, restos sia malfido, la re memoro al la ŝoko, al la doloro kaj la timo, ke tio ripetigos. Ekde nun ĉiu movo estos akompanata de atentemo, de la streĉeco de la aliaj sensoroj, konscie gvidata de la prudento. Per tio la movoj estas sen la facileco origine akirita, ili restos plej ofte en streĉo kaj spasma.

Tio cetere validas ankaŭ por malfortvidantoj. Mi memoras iun knabinon, kiu kutimis kuri laŭlonge de koridoro ĝis en la ĉambro de fratino. Iun tagon la fratino fiksas gimnastikan stangon je la kadro de la pordo. la malforte vidanta knabino denove kurante tra koridoro en plena rapideco batis per la vizaĝo kontraŭ la stangon. Estas ja memkompreneble, ke ŝi ne nur difektis kelkajn dentojn. Ekde tiu tempo la ĝis tiam gaja kaj senzorga knabino ne plu kuris ne nur laŭlonge de la koridoro, sed tute neniam.

Ĉi loke mi atentigas pri la danĝero, ke la rajdinstruisto ne ĝuste pritaksas la reston de la vidpovo de la rajdlernanto. Ĝenerale malfortvidantaj rajdantoj preskaŭ ne frapas en la rajdgrupo, kaj ju pli inteligentaj ili estas, des pli ili sukcesas kompensi sian vidmankon aŭ ĝin kaŝi. Pro tio estas necese atenti, ke estas zorge instruata la korekta distanco inter la rajdantoj speciale en la ofte ne sufiĉe bone lumigitaj haloj, kaj atenti pri la ĉevaloj starantaj flanke de la stalovojoj, pri renversitaj balailoj aŭ aliaj ilaroj, kaj aparta atento necesas dum la purigado de hufoj, se la vidhandikapitaj rajdantoj ne lernis sin helpi per la sento de la manoj kaj tro alproksimiĝas la vizaĝon al la piedo de la ĉevalo por konstati la sukceson de siaj klopodoj!

Jam antaŭ la komenco de la rajdinstruado kaj ankaŭ poste ĉiam denove estu donata al ambaŭ grupoj – blinduloj kaj malfortvidantoj – la ebleco libere kuri kaj petoli en la halo kaj eĉ ankaŭ fali, por ke ili akiru spertojn pri la grandeco de la ejo kaj oni donu al ili la eblecon sin movi sen timo pri hazarda puŝo kaj montri al ili jam de komenco la

ĝustajn rilatojn de la falado eĉ de sur la ĉevalo sur la molan plankon. (Plimalfrue sekvos tiurilate pliampleksaj falekzercadoj.) Ni havis foje en la komenca prizorgado blindan knabinecon, kiu lamis. Neniu sciis kial: Ŝi estis korpe tute sana. La klarigon ni trovis nur kiam ni ekkonis la avinon. La infano estis de ŝi edukita. Ŝi eklernis paŝi tenate per la mano – kaj la avino lamis! La infano transprenis tiun movon kiel normalan, sen havi la eblecon de la optika korekto pere de imitado de la korekta irado de aliaj homoj.

## 2. Instruo je la longo por komencantoj, precipaj postuloj je la longo-ĉevalo

Ĉi ekzemplo gvidu nun trakti la movojn de la ĉevalo. Ni ĉiuj konas la sloganon pri la „nelimigita movo-modelo de la ĉevalo“, ni konas la tridimensian svingadon de la ĉevaldorso, kiu estas transdonata al la rajdanto. Estas kompreneble, ke la blinda rajdanto, kiu ĝis nun propravole pene kontrolis ĉiujn siajn movojn, ne ĉiam tuj sukcesas ekordigi tiujn al la movoj de la ĉevalo. Oftaj ekzercadoj necesas, por ke li lernu sin malstreĉi. Por tion atingi necesas la kunhelpo de bone instruita ĉevalo, kiu senĝene daŭrigas la korektan paŝadon, malgraŭ la streĉo kaj spasma de la rajdanto. Kiam la blinda rajdanto liberigas de la streĉo kaj spasma kaj akordiĝas al la ĉevalmovoj, ekestas por li nepriskribebla travivaĵo adapti sin sen timo de kolizio. Pro tio mi konsideras tre grave sufiĉe longan longlaboron – kaj nome sur la nuda ĉevaldorso kun voltea zono. Ankaŭ se oni ne povas malhelpi, ke la blinda rajdanto – same kiel iu alia – foje falas, oni nepre zorgu, ke tio absolute ne okazu dum la fazo de la fidakiro al la ĉevalo je la longo.

Sekvante mi volas aparte mencii kelkajn postulojn rilate la longoĉevalon por blindaj rajdantoj:

- Ĝoja, laŭtakta antaŭenirado.
- Volonta obeo kaj plena fido al la instruisto.
- Nermaltrankviligebla daŭrigo de la ordonita irmaniero kaj de la rapideco, la kapablo pli- aŭ malplirapidigi la rapidecon laŭ ordono, same obeeme, atendente stari, tiel longe kiel tio estas postulata.
- Akurata irado je la longo, por havi la eblecon ŝanĝi la direkton tra la tuta aŭ tra la duona rajdhalo (rajdloko) dum la ekzercado laboro je la simpla longo.
- Instruado je la duobla longo, por doni al la blinda rajdanto la eblecon eksenti direktoŝanĝojn, iradfigurojn, flankeniradon kaj por la instruado de ekvilibro kaj kunordigo (= koordinado).
- La ekzercado je la longo por blindaj rajdantoj havas la sekvantajn celojn:
  - Forigado de la moviĝada deficiito (= reduktado de mova debileco).
  - Sentoakiro pri la movoj de la ĉevalo.
  - Kreado de rajdadaj (= rajdistaj) sentoj.

Al la unua punkto apartenas la kutimiĝo de la blindulo al la cirklo. Tio prezentas ofte grandajn problemojn, unue dum la longolaboro kaj poste je la rajdado laŭ la cirklo. Ĉefe mi laboradas en cirklo kun radiuso de 10 m (20 m diametro) kun la tuŝado de la rajdtrakto (irvoĵeto laŭlonge de la muro) (germ.: Hufschlag – france: piste – angle:

track) – rajdtrakto for de la cirklopunktoj. Tio ebligas al la blinda rajdanto ricevi la senton por la prirajdata cirklo! Poste, dum la memstara rajdado, li devos ankoraŭ sufiĉe peni por preciza cirklorajdado – pro tio li ne devas lerni ĝin de mi „malkorekte“, lasante lin rajdi laŭ cirklo kun radiuso de 7-8 m. Ekzemple estas ankaŭ grave ekzerci la direktŝanĝojn de la cirklo al la duona rajdhalo, kion la blinda rajdanto devas lerni precize diferencigi. Simplaj voltiĝirekzercoj, kiel unuopulo aŭ kun partnero helpas lin je kreskanta fido al la ĉevalo kaj plialtigas lian sekurecon.

Dum la ĉefa parto de la longlaboro la blinda rajdanto alterne trapasas de la simpla – al la duobla longo-instruprograme, kiu ne nur enhavas ĉiujn tri bazajn iradmanierojn, sed ankaŭ ĉiujn rajdfigurojn inkluzive de serpentinoj, retrovolteoj, pruturnoj (ŝanĝi la direkton per etaj movoj de la antaŭaj piedoj) (germane: Vorhandwendung – angle: turn on the forehand, reversed pirouette – france: pirouette) kaj femurcedo (en la germana: Schenkelweichen – en la franca: céder à la jambe – en la angla: to give way to the leg). Sen propra influo je la ĉevalo li lernas senti la movojn kaj al ili sin adapti. Ĉar li sidas sen timo sur la ĉevalo kaj pro tio ne estas streĉita, li lernas ankaŭ la sentokontaktojn per la femuroj: Li kapablas ĉiam kontroli kaj direkti la paŝojn de la ĉevalo dum la irado kaj troto. Kiam, je la fino de la instrufazo, li ricevas enmanigita la bridon kaj lernas sidi sur la selo kun piedingoj, li estas sufiĉe sentokapabla por scii, ke je la alia fino de la brido troviĝas vivanta ĉevalbuŝo, kun kiu li neniam rajtas perdi la minimuman kontakton.

Post tia instruado, konsekvence ekzercita dum duona jaro, prezentiĝas bildo, pri kiu rajdinstruisto „ĝenerale“ eĉ ne kapablas sonĝi: Rajdkomencanto kun bridoj en trankvilaj manoj sur ĉevalo volonte kaj kviete iranta je la longa brido!

### 3. Rajdado en la halo kaj en la pejzaĝo

Mi skizas ĉi-tie la idealan kazon. En la praktiko bedaŭrinde ofte okazas, ke la blinda rajdkomencanto estas tro frue envicigita en grupon da komencantoj, ĉar la rajdinstruisto esperas pro tio plifaciligi la longinstruadon. Tio okazas ĉiam je la domaĝo de la blinda rajdanto, kiu, nerimarkite kaj pro tio ne korektite de la instruisto, kutimas je maljustaj movmodeloj, kiuj poste nur kun plej granda penado estos korekteblaj. Krom tio, pro pli poste individua instruo li kaŭzas ĝenon je la laboro de la grupo, kaj kaŭzas ĉagrenon, kiu estus facile evitebla.

Novaj malfacilaĵoj, kiuj aperas dum la rajdado en grupo, estas la rajdado en vico unu post la alia laŭ la aŭdopovo, la ĉevalŝanĝo, kaj la memstara rajdado de figuroj je intermiksita rajdado.

La rajdadon unu post la alia laŭ aŭdopovo la instruisto jam povas ekzercadi dum la individua instruado je la fino de la longtrejnado rajdante sur gvidĉevalo. Tiam la blinda rajdanto havas la idealan eblecon koncentrite sekvi la korekte rajdantan gvidĉevalon de la instruisto, sen ĝeno de apudaj bruoj – eĉ sen ordonoj de la instruisto – kaj sen devi tro influi la propran ĉevalon.

Tiurilate mi estas ĉiam denove pridemandate, ĉu ne ĵus ia „gluanto“ ne estus la ideala ĉevalo por blindulo (germane: klebend – angle: nappy – france: rogue). La res-

pondo estas certa „ne“. „Gluado“ estas malbona konduto de ĉevalo kaj mi ne povas imagi, ke ia malvirto de ĉevalo povus havi pozitivan efikon rilate la laboron kun handikapita rajdanto. Idealaj kondiĉoj por la blinda rajdanto estas la korekte instruitaj ekzerĉevaloj pacemaj inter si kaj fidoplenaj al la homoj. Estas grave ankaŭ mencii, ke per tiaj ĉevaloj estas eble, ke la tuta grupo, krom la gvidĉevalo, fojfoje povas rajdi almenaŭ paŝe kaj trote kun la bridoj noditaj je la kolo, sen mangvidado.

La malfacilaĵo de la ĉevalŝanĝo konsistas en la ĉiam nova adaptiĝo al la ŝanĝantaj paŝlongoj kaj svingimpulsoj de la ĉevaloj kaj de el tio rezultanta nombrodiferenco de paŝoj kaj saltoj je la longa kaj mallonga flanko, laŭ kiuj la blinda rajdanto ofte orientiĝas, por gvidi sian ĉevalon korekte tra la anguloj kaj malpermesi al ĝi tro fruan turniĝon.

La plimalfrue ekzercata sekvado de la gvidĉevalo laŭ aŭdo en grupo de progresintoj kaj poste, kiel plej alta grado, la memstara miksita rajdado, postulas de la blinda rajdanto altan instrunivelon kaj grandan koncentriĝon. Ke tio inkluzivas ankaŭ problemojn de integriĝo estas memkomprenebla.

Kiel akompananta helpo la blinda rajdanto bezonas ĉiam denove unuopan instruadon. Se la rajdkorektoj ne multe superas tiujn, kiuj estas donitaj ankaŭ al la vidantaj en la grupo, ili kompreneble okazu ankaŭ tie. Sed se la instruisto konstatas, ke estiĝis malkorektaĵoj, kiuj ne estas „normalaj“ rajderaroj, kaŭze de malperfekta lernprogreso, sed estas kaŭzataj de la blindeco de la rajdanto, devas okazi unuopa trejnado. Kompreneble tio postulas lertan okulon de la instruisto.

La rajdado en pejzaĝo prezentas ĝenerale malpli da problemoj ol la plej multaj homoj imagas, se la blinda rajdanto estas tiel progresinta, ke li regas sian ĉevalon. Se oni entreprenas la rajdekskurson sur signitaj vojoj kun bonaj terenondiĉoj, kie la arboj kaj la arbustoj estas laŭbezzone tranĉitaj, kaj per tio eliminataj, la fontoj de danĝero, la unua rajdado fariĝas grandiosa kaj gaja travivaĵo por la blinda rajdanto kaj lia akompananto. Laŭ nia sperto neniu agrikulturisto aŭ vilaĝadministrado estas kontraŭ propraj iniciativoj. Mia edzo kaj mi ofte ekiris kaj liberigis la vojojn sur kiuj ni rajdis kun niaj blindaj kaj malfortvidantaj lernantoj, (mia edzo sur tere per segilo, mi desur ĉevalo per arbotondilo.)

Dum rajdado tra nekonata tereno oni devas interkonsenti pri certa terminaro por ŝirmi la blindan aŭ malfortvidantan rajdanton kontraŭ danĝeraj branĉoj. Ni faris tion kun humoro: „profunde plonĝi“, „dekstren plonĝi“, „maldekstren plonĝi“, „longe plonĝi“, „elplonĝi“ ktp. Sed plej sekure estas porti kaskon kun mallevebla travidebla plasta ŝirmilo antaŭ la okuloj.

Rajdante en grupo necesas, ke instruita respondeculo rajdu malantaŭ la blindulo por doni al li la necesan helpon, ekzemple se temas pri antaŭ videblaj abruptaj vojturniĝoj dum plirapida rajdado, aŭ pri malgrandaj saltoj (branĉoj sur la vojo). Se blinda rajdanto rajdas kune kun nur unu vidanto estas ĉiam bona komunikadebleco kaj ne estiĝas problemoj.

#### 4. Problemoj kaj eblecoj de la integriĝo

Bone preparita blinda rajdanto (per tio mi pensas, ke li devas troviĝi inter la supera triono je kapableco de sia grupo) ne havas pli grandajn malfacilaĵojn esti akceptata en grupo de nehandikapitaj rajdantoj, se:

- a) la rajdinstruisto jesas lian ĉeeston en la grupo kaj
- b) ke li ankaŭ la grupon povas pozitive aktivigi.

Al tio du ekzemploj:

Mi havas la feliĉon, ke mi povas agi kun iu pozitive kunlaboranta instruisto (nome mia edzo), tial de ĉi-flanke ne ekzistas malfacilaĵoj. Iam mi partoprenis dum certa tempo la instruadon de grupo por helpi knabinon ekde mallonga tempo blinda, kiu havis pro tio ankoraŭ grandajn psikajn malfacilaĵojn. Por ne tro ĝeni la aliajn knabinojn, mi rajdis ĉiam malantaŭ la blindulino. Post kelkaj lecionoj iu knabino sen esti petita turnis sin kaj diris al la blinda rajdantino: „Venu, Sabine, ĉi-tie mi estas, rajdu post mi!” Tio estis la unua paŝo al la integriĝo ankaŭ fare de la grupo, je kiu baldaŭ sekvis aliaj, kaj mia partopreno iĝis superflua!

Jen la alia flanko: Junulo, kiu ankaŭ trovis akcepton en rajdsocieto proksime de sia loĝejo, ĉar mi parolis kun la rajdinstruisto, por ke li provu, revenis post kelkaj lecionoj tre malfeliĉa. La instruisto nur unufoje senpacience diris: „Ha, kion vi faras, ĉiam vi intermiksiĝas ĉi-tie!” – kaj la tuta grupo reagis negative kontraŭ li. Li ne plu povis resti.

Al la rajdinstruisto devas esti klare, ke li estu ankaŭ edukisto, kaj tio por ambaŭ flankoj. Al la nehandikapitaj rajdantoj devas esti klarigita, ke ili perdas nenion de sia persona libereco, kiam ili praktikas korektecon, konsideremon kaj helpemon; al la handikapitaj devas esti dirate, ke ili unuflanke ne havas rajtavantaĵojn, aliflanke ili povas kontribui al la reciproka kompreniĝo, sen esti tuj ofenditaj, se ili diras al la nehandikapitaj homoj, kiamaniere oni konduku sin kun ili kaj kun ilia aparta handikapo.

Kiel konkludo jen lasta ekzemplo:

Tiu Sabine, pri kiu mi jam parolis, pro la fakto, ke sia galopanta ĉevalo flankensaltis ĉe angulo, kaŭzis foje sufiĉe grandan malordon en la grupo kaj eĉ dolorigis rajdintinon. Mi aŭdis iom da grumblado inter la aliaj, sed poste ankaŭ voĉon dirante: „Do, kio estas tio, unue ĝi povus okazi ankaŭ al ni, kaj due, ŝi estas ja blinda.” Kaj ili daŭrigis sen problemoj. Je la fino de la leciono mi rajdis flanke de Sabine kaj diris al ŝi, ke laŭ mia opinio, sendepende de ŝia poŝmona situacio, ŝi devus oferti al ĉiuj limonadon aŭ glaciaĵon. La unua reago de Sabine estis kolero. „Kial do, mi ne kulpas, mi estas ja blinda.” – Mi klarigis al ŝi precize, ke ŝi tamen iom kulpis, ĉar la afero ne estus okazinta, se ŝi pli bone estus reginta la ĉevalon, kaj due blindeco absolute ne estas kaŭzo por ne pardonpeti pro propra mallerteco, kaj kiel ĉiu alia per afabla gesto esprimi dankemon pro la kamaradeco de la aliaj. Sabine sekvis mian konsilon; kaj mi opinias, ke tiuj dudek minutoj, dum kiuj ili komune trinkis limonadon en la rajdgastejeto, estis vera helpo al plibonigo de interkompreniĝo.

Se mi sukcesos, ke en niaj rajdejoj vidantaj, malfortvidantaj (viddebitaj) kaj blindaj

rajdantoj ne nur toleras sin reciproke, sed ankaŭ lojale kaj kamaradece kunsportas, tiam, mi opinias, ni atingis nian celon.

Adreso de verkistino:

Ellnor Stern  
Oberstudienrätin an Sonderschulen  
Schule für Blinde und Sehbehinderte  
Hamburg,  
Neuer Weg 8  
2083 HALSTENBEK

## Internacia Lernejo en 1987

La estraro de ILEI kunsidis en Sintra dum la 17-a konferenco 5-foje kaj traktis plurajn kurantajn aferojn de la Ligo kaj diskutis kelkajn novajn paŝojn. IPR raportas.

1. Fakte, IPR nun havas ideon pri tio kio estas longa akuŝo. ILEI posedas novan statuton! La klopodoj retroiras ĝis la konferenco en Lokarno.

La ĝenerala sekretario d-ro Dazzini kunportis grandan stokon de 4 0000 ekzempleroj. La statuta teksto estas presita en Italio en la formo de faldprospekto. Feliĉe ĝi ne estas tro dika. Ĉiu paĝo entenas 4 kampojn disigitaj per faldo. La novaĵo estas ke krom la kutimaj paragrafoj nun estas aldonita regularo.

La estraro konsideris la proceduron kiel disdoni la statutojn. Kvankam la elspezoj por la presado ne estas tro altaj tamen ĝi opiniis, ke la kostoj ne ŝarĝu entute la ligan kason – pro estontaj elspezoj (Jubilea Jaro!).

Ĉiu sekciestro ricevos unu ekzempleron senpage poste li mendu la deziritan kvanton kontraŭ pago ĉe la kasisto de la Ligo, sinjoro Andreasson. La prezo por unu statutkopio egalas al la kostoj: eltenebla por ĉiu sekcia kaso.

La estraro krome sugestas traduki la statuton ankaŭ nacilingve, ĉar ĝi same povos servi kiel informilo kaj varbfolio informante pri la celoj kaj taskoj de la Ligo.

2. ILEI disponas nun pri faldprospekto por informaj celoj. Ĝi estas flava aŭ ruĝa: alparolataj estas Esperanto-parolantaj anoj de pedagogaj profesioj, kiuj ankoraŭ ne estas membroj de nia Ligo.

La faldprospektoj prezentas fronte la nomon de la Ligo kaj laŭpage la adresatojn, celojn kaj intencojn pri IPR, membrajn landojn, okazintajn konferencojn, pri Interŝanĝada loĝa-servo, dorse oficialajn adresojn.

Sed same grave estas atingi la reston de la pedagogia mondo: t.e. informi kaj varbi la gekolegojn nekonantaj la Internacian Lingvon.

La estraro esprimis sian konvinkon ke unu relo al la celo estas la premo de la instruistaro. La faldprospekto disvolvas sian plenan efikon, se ili estos haveblaj same en nacia lingvo.

La alia relo por konstrui la „Esperanto-domon” en la publika lernejo estas la gelerntantoj. Tiurilate la estraro baldaŭ konigos ĉi-loke siajn ideojn.

3. Estas notinde alia intenco de la estraro, celante aranĝi servan reton por membroj de ILEI. Kiel unua paŝo estas nominda la Interŝanĝada loĝa-servo. Jam estas disenditaj demandiloj al la sekciestroj. Ili estas petataj pludoni ilin al la membroj.

Se la estraro disponas pri taŭga nombro de ofertantoj, estos eldonita adresara listo pri ILEI-anoj pretaj disponigi post reciproka interkonsento senpage privatajn ĉambrojn al vojaĝantaj ILEI-anoj.

Ĉiuj interesitoj turnu sin al landaj sekcioj.

Averto: La loĝa servo validas nur por membroj!

4. La estraro decidis pri la konferencoj por 1984 kaj 1985.

ILEI estos 1984 en Jugoslavio kondiĉe ĝi ricevos respondon ĝis la 1-a de Decembro ĉi-jare. La planita loko nomiĝas Skofja Loka.

1985 okazos la konferenco en Germanio en la urbeto Königswinter senpere apud la Rejno. Ĝi estos tempe tiel datita ke unu aŭ du tagoj poste komenciĝos la UEA-kongreso en Augsburg.

5. La estraro konfirmis sian decidon organizi okaze de la Jubilea Jaro en 1987 Internacian Lernejon por demonstri ke infanoj venantaj el diversaj lingvaj medioj kapablos partopreni kaj apliki dum la instruado aŭ dum liberaj aktivecoj la Internacian Lingvon Esperanto.

La estraro de ILEI emfaze alvokas ĉiujn sekciojn kaj membrojn tre favore dediĉi sian atenton al tiu grava publika manifestacio, disponigi sian kunlaboron aŭ helpon, kaj esti preta aktive partopreni kiel Internacia Instruisto uzante Esperanton en Internacia gekolegato.

La Internacia Lernejo unuigu 80 ĝis 90 infanojn inter 10 kaj 14 jaroj kiuj lernis almenaŭ du lerneajn aŭ kursajn jarojn la lingvon. Speciala informilo estas havebla far la prezidanto.

# Modernigita lernejo postulas ankaŭ novan instruiston

Jozo Marević

## Resumo

Gravaj sciencaj malkovroj kaj teknikaj novecoj kaŭzas iomete ŝanĝigitan vivmanieron kaj studadon. Interalie la homo devas subigi la teknikon kaj sciencnivele alkuti-miĝi al ĝi. Same tiel, li devas utiligi la riĉajn fruktojn de la moderna tekniko kaj uzi ĝin en la klerigprocedo.

En tiaj novaj kondiĉoj la homo sentas sin devigita ankaŭ lerni kaj klerigi sin post la orde finita studado, por ke li povu sukcese labori kaj pli kontente vivi.

La moderna teknologio estas kaŭzo kaj konsekvenco de la permanenta klerigo. Tial meminstruiteco kaj daŭrigo de studado kadre de variaj vidpunktoj de la permanenta klerigo estas ankaŭ por la instruistoj bezono kaj devigo. Nur tiamaniere la lernejo „nobligas” nian nunecon kaj garantias al ni kaj al nia estontaro pli bonan kaj pli feliĉan estontecon.

## Iomete ŝanĝita rolo de la instruisto

Problemo pri la klerigo de instruistoj neniam estis tiel aktuala. Ŝanĝoj de instrumentoj kaj -formoj, kaŭzitaj per ŝanĝoj kaj evoluo de la novaj teknikaj iloj, postulas ne nur plilarĝigon de la profesia klerigo de instruistoj per ĉiam pli novaj sciigoj kaj enhavoj, sed ankaŭ studadon de la novaj specialistaj fakuloj: programeroj, pedoteknikistoj k.t.p. En la lerneja reformo, kiu senĉese, pli aŭ malpli evidente, ĉeestas kaj devas daŭri, jam delonge estas klare, ke tiu reformo ne sukcesos sen adekvata plua kapablo de instruistoj. Tion postulas iomete ŝanĝigita rolo de la lernejo, novaj eltrovoj kaj povegaj eblecoj de scienco kaj teknologio. Sen la perfekta kono de la moderna tekniko kaj ĝiaj agado kaj efiko, la instruisto ne povas efike kaj sukcesplene uzi ĝin. Eblas aktivigi ĉiujn perceptajn sferojn de la lernanto nur per la regula apliko de instruiloj.

Malgraŭ ĉiuaspekta tekniko kaj multnombraj iloj, rolo kaj signifo de la instruisto dum la eduk-kleriga procedo restas neanstataŭigebla. „La instruisto estas centra figuro en la instruprocedo, ĉar kvalito de la klerigo, kiun li donas al la gelernantoj, kerosence dependas de liaj kapablecoj kaj valoroj. Ne ekzistas pli produktiva investado

ol tiu, kiun oni investas en la klerigon de la instruistoj. La ŝtato plej malbone farus, se ĝi ŝparus je tiuj, al kiuj konfidas la plej grandvaloran riĉaĵon – konscion de sia junularo. Se ni deziras, ke la eduko kreas tiun kategorion de homoj, kiu estas urĝe bezonata al moderna socio, estas esence plialtigi la ĝeneralan standardon de instruistaro kaj klerigon de la instruistoj, ĉar la eduko ne povas sen risiko kaj serioza disreŝiĝo daŭrigi la ĝisnunan rekrutadsistemon de instruistaro, kiu restas sen kvalifikoj por la instruista laboro.”<sup>1</sup> Ĉi tiuj vortoj sonoras kiel lamentado super la urĝa problemo pri manko, eĉ ega manko de bona kaj sufiĉa instruistaro. Nuntempe preskaŭ signifas ion la malnova proverbo: Quem dii oderunt, paedagogum fecerunt (dioj damnis tiun, kiun ili elektis pedagogo). Tamen dum profesiaj idealoj de edukistoj, en multaj landoj ilia standardo estas endanĝerigataj<sup>2</sup>, junaj homoj, kiuj decidigis al la instruista profesio, bezonas pli multe da morala fortigo kaj materiala apogo.

La ŝanĝigitaj kondiĉoj en la instru- kaj lernoprocedo devigas la instruiston, ke li, ĉirkaŭrigardante al medio, en kiu li agadas, kaj al sia ĉiutaga laboro, kontribuu frukto-done kaj intense al la pliriĉigo de la instruprocedo, ekkonu, komprenu kaj superregu eblajn kontraŭdirecojn kaj ke li en supervenkado de tiuj kontraŭdirecoj eltrovu kvalite novajn instrumentojn. En tio respeguliĝas dialektika didaktiko, kiun grandparte kondiĉigas la ege evoluanta scienc-teknika ekspansio. Tial ne surprizas opinio de la unuopaj pedagogoj, ke „nova rolo de la instruisto estas la iĝanta pli dialektika ol didaktika”.<sup>3</sup> En novaj kondiĉoj la instruisto „devas esti taŭga sukcese stimuli progreson de la aliaj kaj aprobi juĝon pri sia propra prospero. Informfontoj, motivoj kaj metodoj estos lia devizo. Ni konas ege malmulte da manieroj por inciti motivaĵon, ĉar la klasikaj teorioj pri la edukado ne interesiĝis pri la infano, studento, plenkreskulo, tiucele, ke funkcio de la lernantaro transformiĝu en la funkcio de animatoro. De tie kapitala signifo de la vera motivaĵo, kiu gvidas al progreso.”<sup>4</sup>

En ĉiuj landoj kaj edukaj medioj sentiĝas latentaj bezono de la inaŭgurado de mult-imedia principo. La argumentado favore al tiu principo ne necesas. Akompanie al tio la permanenta klerigo de instruistoj ege urĝas, ĉar ilia konigo kun inovacioj, novaj metodoj kaj moderna teknologio praktike serĉas solvado. En Svedio, ekzemple, estas regule organizataj somerkursoj, kiujn jare vizitadas pli ol 15 mil instruistoj. Simila praktiko regas en Usono, kie ĉe universitatoj estas malfermitaj someraj lernejoj por instruistoj, kiuj daŭras po tri semajnoj.<sup>5</sup> Refreŝigo (refreshing) kaj plilarĝigo de la akiritaj konoj, konigo kaj sciigo de la plej novaj atingiĝoj en fako, pedagogio, metodiko, psikologio kaj kleriga teknologio, devus ekesti unuarangaj taskoj kadre de la permanenta klerigo de instruistoj.

La empiriaj esploroj pri persono kaj studado akcentas la interrilatojn de la lernado kaj persontipo ĉe instruistoj kaj lernantoj. „La instruistoj, ne nur lernantoj, devas agnoski bezonon de la antaŭenigo de sia propra progresado kaj intelekta nivelo, por ke ili povu kontentiĝi per sia sendependeco, emocia maturiĝo kaj eklernu sukcese utiligi proprajn erarojn kaj sukcesajn agojn.”<sup>6</sup> La instruisto devas esti al la lernanto ĝusta spegulo kaj ĉefargumento pro la vero, kiun li predikas. La fama John Locke diras iuloke, ke instruoj restas senfruktaj, se ili ne estas atestataj per vivezemplo. La instruistoj plej efike influos al la lernantoj, se ili



senĉese lernas kaj preparas por siaj lernantoj ĉiam ion nova. Por la malnova lernejo la progresemaj pedagogoj antaŭvidas baldaŭan definitivan finon. „La instruistaro mem rompiĝos premita de la novaj imperativoj. Ŝablonigo, tempa kaj loka, devas esti ĉesigata, se oni klopodas, ke la hodiaŭaj kaj morgaŭaj lernantoj profitu progreson en sia plena individua ritmo... Studobjektoj kaj enhavo de la instrueroj devas esti reviziitaj. La diplomatribuo okazos laŭ novaj kriterioj.”<sup>7</sup> Ŝanĝendaj estas ne nur eduka kaj kleriga medio sed ankaŭ nia konduto kaj nia morkonformeco. Temas evidente pri ĉiuflanka ŝanĝo de ĉiuj subjektoj en la eduka kleriga procedoj.


#### La permanenta klerigo estas monda evolustrategio

La instruisto devas senĉese klerigi sin, por ke lia helpo ekestu al la lernanto adekvata, kompleta kaj konvena. Iam lernitaj konoj ne povas batali kun la povega socidynamikeco, sciencevoluo kaj dialektikaj ŝanĝoj, ĉar „la homo kiu vivas legante ĉiam la samon, perdas pensadkapablecon” (E. Carpenter). Combs<sup>8</sup> substrekas, ke la instruistoj ankaŭ estas individuistoj, kiuj devas posedi memdisciplinon kaj neriproĉeblecoj. Tiuj ecoj restas la instruistaj ankaŭ en la nova lernejo. Estas akcentata bezono, ke la instruisto „iru survoje de la moderna pedagogio, kiu iusence estas sintezo de la tradicia kaj nova kaj ne konfuzio.”<sup>9</sup> Tiu sintezo ne estas samtempe kompromiso de juĝoj, deziroj kaj profesi-kulturaj bezonoj. La sintezon simple devas reflekti la instruista sinteno al revena kaj permanenta klerigo kadre de la globala koncepto pri permanenta kaj dumviva klerigo.


La permanenta klerigo havas gravan rolon en la vivo kaj laboro de ĉiuj homoj (figuro 1). Pro la instruistaro ĝi estas gravega, ĉar ĝi „signifas finon de la supra enciklopedismo, eliminon de analfabetismo kaj de stereotipa kono”.<sup>10</sup> Laŭ B. Schwartz la revena klerigo estas „rimedo kiun la homo akceptas en la variaj periodoj de sia vivo, en variaj stadioj de sia evoluo rilate al diversaj privataj kaj sociaj funkcioj, kiujn li plenumas en la socio”. Ĝenerale „la revena klerigo estas esprimo kaj bezono de la esploroj de la lernejo por renoviĝi maldungante obeon al la estinteco, realigante ‚purigon’ de la nuntempeco”.<sup>11</sup>

Jam la granda pedagogo J.A. Komensku skribis pri egalaj bezonoj de „vivo kaj lerno”, ĉar la lernado estas vivdaŭra bezono. „Klerigo estas socia procedo. „Klerigo estas evoluo. Klerigo ne estas preparo por la vivo; ĝi estas la vivo mem.” (John Dewey)

Klerigo havas sian komencon kaj pravigon en homaj politikaj, sciencaj, kulturaj kaj teknologiaj bezonoj. Tial ĝi devas esti temo de pli larĝaj sociaj esploroj. Sed la limoj de pedagogiaj esploroj ne estas klare dispartitaj de aliaj sciencaj disciplinoj. La nuntempa teknologia evoluo kaŭzas tian interdisciplinan sciencan kunlaboron, kies rezultojn utiligas la hodiaŭa pedagogio tiugrade, ke povas profiti, laŭ bezono kaj ebleco, homo sapiens, homo faber, homo technicus kaj homo politicus. Tiamaniere, klerigo havas sian kaŭzon en kulturaj, sciencaj, teknologiaj kaj litikaj sferoj kaj troviĝas en la centra fokuso de vivagadoj. Klerigo tiel estas vivintegra eco de la homo (vidu figuro 2). Kiel nova pedagogia fenomeno, la permanentaj aspektoj de la klerigo ne nur altiras fakulojn ekster la kleriga sfero, sed ankaŭ tiu permanenta klerigo iĝas hodiaŭ iaspeca obsesio.



Figuro 1: Integiĝo de labor- kaj klerigsfero



Figuro 2: Klerigo en fokuso de homaj politikaj, kulturaj, sciencaj kaj teknologiaj bezonoj

Pro diversaj socio-politikaj sistemoj oni varie pritraktas la (permanentan) klerigon. La formoj de la permanenta klerigo povas esti ankaŭ nur korektilo de la sociaj diferencoj. Dubo tute ne ekzistas pri tio, ke ĝi senprokraste devas esti ilo por internaciigo de la homaj rilatoj kaj por la realigo de pli humana mondo. „Ĝi nuntempe prezentas la grandan esperon. Tiu espero kuŝas sur kredo je homo, sur kredo je lia kapableco iĝi plenkreska, eĉ iĝi respondeca por siaj pensoj, siaj sentoj kaj siaj determinoj.”<sup>12</sup>

#### Kleriga teknologio estas unuaranga helpo al la instruisto

Nuntempe jam ekzistas multego da faka literaturo pri taskoj, utilo kaj efikeco de la moderna kleriga teknologio kaj pri taskoj de la amasaj komunikiloj en vivo kaj klerigo. El la vidpunkto de pedagogio, tiu literaturo ankoraŭ ne sukcesis elimini skeptike-

con de la instruistoj je la nuntempa kleriga teknologio,<sup>13</sup> kio malfermas apartan pedagogian problemon. Ĝis hodiaŭ, ekzemple, nek televido nek radio ne troviĝis en la instruprogramoj de plejparto da landoj.<sup>14</sup> Tiu fakto tute ne strangas, se oni scias, ke „multaj instruistoj opinias, ke la televido misformas la realan mondon; la aliaj eĉ asertas, ke la televido eĉ gloras la antisocialan konduton, iniciatas kriminalecon kaj malvirtojn.”<sup>15</sup>

Kial la instruistoj malŝatas uzi la klerigan teknologion, kial ili kritikis ĝin, eĉ bagatelumas? Multaj deziras komforton, kaj tiusence ĉiuj inovacioj maltrankvilas vivon kaj labormedion, la aliaj timas uzi ĝin, kelkaj tute ne komprenas, kiam kaj kiel utiligi la modernan teknikon dum la instruprocedo. Sed oni ne povas malatenti praktikajn postulojn de nia ĉiutageco. Tiun problemon substrekas M. Norman kaj James F. Porter: „La esenca problemoj kiu apudeblas al ĉiuj klerigaj sistemoj estas tiu inter teorio kaj praktiko, inter idealeco kaj aktualeco, inter mito kaj realeco.”<sup>16</sup> Koncerne la postulojn de la nuntempa teknika progreso, la lernejo devas kontentigi dezirojn de la familio, esperojn de la lernantoj, kaj postulojn de la socio. Tial estas nepre „epistemologia spirito” de la instruisto (Piaget). Je tio devas esti rekonebla la moderna lernejo.

Foresto de la moderna tekniko dum la eduk-kleriga procedo absurdas ĉiuflanke. Ne uzante ankaŭ en la instruprocedo la plej modernajn instruilojn, la lernanto, la homosentas sin detranĉita de la realeco, de vivo, de normala kurado. Homo faber regante kaj koncernante modernan teknikon, realigas regnon de la libereco, zignas pri regado super volo kaj konscio de la aliaj, kio absolute garantias regnum hominis. Por tiuj celoj nepre estas instruista preteco prepari sin kaj „sanktejon” de la lernejo al nuntempaj kaj futuraj mirakloj de la tekniko. Kiamaniere ni estas pretaj ambaŭmane kaj vole ekpreni tiujn miraklojn? Jen ekzemple, kion opinias la subjektoj de la kleriga procedo, instruistoj kaj lernantoj pri la komputilo? Fare de kio oni devas uzi la komputilon en la instruado? La demando\*

„Komputilo en la instruado estas:

	tekstas la respondoj de la lernantoj instruistoj	
– nekomperebla perilo por la sukcesa instruado	31,3%	22%
– necesa instruilo	51,5%	41,5%
– malutila por la lerno- kaj instruprocedo	4,7%	19%
– ludilo	12,4%	18%

Trarigardante la respondojn de la instruistoj, strange sonoras la fakto, ke 19% de ili pritaksas la komputilon malutila por la lerno- kaj instruprocedo. Ĉu estas normale atendi tian grandan diferencan en la rezonado de instruistoj kaj lernantoj pri la instruenhavo? Laŭ la esploroj priskribitaj en iu magistra laboro (Dragica Suljagić: Komparo

\* La enketo estis farita kaj prilaborita komence de la jaro 1981 en Zagreb. Koncerne la bazan aron, ĉiu 30-a lernanto (entute 1 000) kaj ĉe instruistoj same tiel ĉiu 30-a (entute 300) estis enketitaj. Ĉi tie ni citas nur unu el la demandoj.

de la efikeco en la instruado pere de la komputilo kaj la klasika instruadprogramado, Zagreb, 1979, p. 29) inter 48 gelernantoj 39 respondas, ke la instruhoro per la komputilo estas pli interese ol klasika instruhoro.

Post unu instruhoro pere de komputilo la lernantoj ĉi-sekve signifis laciĝgradon de 0 ĝis 5:

12	15	6	10	2	3
0	1	2	3	5	5

12 lernantoj konsideras, ke la instruado per la komputilo tute ne laciĝis ilin, 15 lernantoj opinias, ke ili malmulte laciĝis dum tia lernado kaj nur 3 gelernantoj estas konvinkitaj, ke la instruhoroj dum kiuj estas plejparte uzata komputilo, laciĝas ilin. Pli bone estas tio klara en iliaj respondoj al la demando: „La instruado (lernado) per la komputilo estas:

- tro facilaj (9 lernantoj jesas)
- meze malfacila (35 lernantoj elektas tiun solvon)
- malfacila (4 lernantoj respondas tiel)
- tro malfacila (neniu tia respondo)

La demandon „Ĉu mankas al vi senpere helpo de la instruisto dum tia instruado?“ 24 lernantoj (50%) jesas.

La demandon: „Kio plej multe plaĉas al vi en la instruado per la komputilo?“ la lernantoj respondis jene: „Al mi plaĉas precizaj klarigoj“, „Mi ĉiam scias, kiam mi eraris“, „Memstara aliro al la konkludoj.“...

Tiu eta enketo argumentas, ke la opinioj pri la komputila instruado disiras. Sed, revenante denove al la respondoj de la instruistoj, ni ne povas preterlasi iliajn respondojn. Ĉu estas normale, ĉu tute estas atendate, ke 18% de instruistaro konsideras, ke la komputilo estas ludilo? Se estas tute normale atendi, ke 12% de lernantoj opinias pri la komputilo la samon, ni devas senti nin dum nia (malprogres) nuneco iomete hontitaj, ke ekzistas la homoj kiel rekta alfronto preskaŭ al ĉiuj novecoj tie kie oni tute ne povas atendi tion. Se tia situacio regas en unu sola loko, en unu kolektivo, ne maltrankviliĝus. Oni povas konkludi laŭ esploroj, enketoj en multaj lokoj kaj personaj interparoloj kun alilandaj gekolegoj, ke la sama situacio estas en ĉiuj landoj kaj medioj.

La moderna teknologio ne minimaligas la instruistan rolon sed ĝi pli ege akcentas tiun rolon. Utiligante moderne la teknikilojn, la instruisto posedas gravan eblecon aktivigi kaj „bombardi“ sensorojn de la lernanto kaj tiamaniere li pligrandigas memorkapablecon kaj malpliigas faktoron de la forgesado, subkondiĉe ke la kleriga teknologio estas uzata adekvate, konvene, celtrafe kaj pripense. Ankoraŭ ne ekzistas instruilo aŭ instrumentoj, kiuj povus preni sur sin la ĉefrolon de instruisto aŭ kiuj liberigus la lernanton de laciĝo dum akiroj de la novaj scioj. Tial la instruista rolo sence de konsilado, orientigado kaj koordinado dum la lernoprocedo kaj de selektado de la scifontoj estas ege akcentata eĉ en la tempo de la plej moderna teknologio, kiu ofertas

sian povegan helpon. El la pedagogia aspekto, optimuman instruadon prezentas kombino de instruisto kaj aŭtomato (teknikaj iloj) sub la kondiĉo, ke ĉiu plenumas korektan rolon. Ĝi estas ĉe la tekniko sence de la kvanto kaj ĉe la instruisto sence de la kvalito. Al la maŝino estas atribuita rapideco, kaj al la homo organizado.

Klerigante sin daŭre en akirado de novaj scioj kaj en optimumigo de la modernaj instrumentoj kaj apliko de plej modernaj iloj, la instruisto evitos eblajn vakuojn kaŭzitaĵoj de la povega evoluo de scienco kaj teknologio. Samtempe li tiel plej bone helpos al siaj lernantoj, ĉar en tia aktiveco konsistas la (permanenta) klerigo de instruisto, kiu estas celdirektata „al helpo de la lernantoj dum akirado de lerteco, ekkonoj, kutimiĝoj, konceptado, mondkoncepto, kio ebligas al ili pli grandan intereson por lernado“. <sup>17</sup> Bona kaj sperta instruisto batalas por la scivolo de la lernanto, ĉar la rolo de kuratoreco transformiĝis en la „puran“ rolon de instruado. <sup>18</sup> Aliflanke, senco de instruado ne konsistas nur en la scitransfero, sed ankaŭ, kiel diris Alfred N. Whitehead, en la metamorfozo de knabo en la povegan homon.

Neniu pedagogo asertas, memkompreneble, ke la moderna tekniko estas kleriganta laŭ si mem. En ĝi devas esti enkonstruita la didaktika funkcio, por ke ĝi ekestu kleriganta. Tio dependas de kelkaj faktoroj, sed la ĉefa, la nekompareble plej grava estas tiu de instruisto.

La instruisto nuntempe ne povas esti lasita al si mem, al sia ĉiutageco, detranĉita de la aliaj fakaj rondoj. Li ne povas progresi sen kunlaboro kun aliaj samfakuloj, sen la daŭra agado en fakaj aktivoj, sen iama vizitado de laborseminarioj, sen la orda legado de fakrevuoj. Li estas devigita ŝanĝi spertojn kaj serioze plenumi siajn taskojn. „Instruado ne estas spektaklo. Kion instrui, kiamaniere, kiunivele, ne povas esti demando de momento aŭ de unuopulo.“ <sup>19</sup> Kreiveco estas propeco, sed la instruprogramoj tamen estas komuna afero.

Kiel daŭrigi la studadon, kiamaniere multoblige sian scion kaj perfektigi ĝin, cerbumas diversspecaj fakuloj. Variaj vidpunktoj de la permanenta klerigo estas perfektigataj je distanco. Estas eksperimentataj ankaŭ tiuj klerigformoj por la instruistoj, <sup>20</sup> ne kiel provŝarĝo, sed kiel sukcesplena kaj nepra praktiko. Kian lernejon ni havos, dependas de la socio kaj de la instruistaro, ĉar ambaŭ batalas por pli feliĉa estonteco. Laŭ Fichte, kia estas socio, tian lernejon ĝi havas.

REFERENCOJ  
(Literaturo)

1. International Conference on the World Crisis in Education, Williamsburg, Virginia, 1967, Teacher in the World 5-9.
2. Alberto Granese, Dijalektika odgoja, Školska knjiga, Zagreb, 1978, p.22.
3. B.G. Messialas & J. Zevin, Kreativität im Unterricht, E. Klett Verlag, Stuttgart, 1969, p. 36.
4. James Lynch, Education permanente et la formation du personnel de l'éducation, IVE monographie 5.
5. Recent Trends in Teachers Recruitment, OECD, paris, 1974, p. 20-26.
6. J.B. Thomas, The Self in Education, NFER Publishing Company, Oxford, 1980, p.15.
7. Georges R. Boulanger, Kibernetička pedagogija, en la libro Izazov kibernetici, Centar za društvene djelatnosti, Zagreb, 1971, p. 223.
8. A.V. Combs, Teachers too are individuals, en la libro The Self in Growth, Teaching and Learning, Inglewood Cliffs, New Jersey, Prentice Hall, 1965.
9. Georges Snyders, Pédagogie progressiste, Presses Universitaires de France, Paris, 1975, p.12.
10. Teresa R. Agrusti, la ricera didattica, Le Monnier, Firenze, 1978, p.24.
11. C. Russo, Descolarizzazione, educazione permanente e educazione popolare, en „Annali della Publica Istruzione”, Firenze, Le Monnier, XXI, numero 1, januaro 1975.
12. Paul Lengrand, Introduction a l'éducation permanente, UNESCO, jugoslava traduko, Beograd, BIGZ, 1976, p.88.
13. Dieter Baache, Medienerziehung-Medienarbeit, en „Medien & Erziehung, München, 1979, numero 4, p.194.
14. Walter Menningen, Fernsehen, Unterhaltungsindustrie oder Bildungsinstitut, W. Kohlhammer, Mainz, 1971, p.124.
15. Vernon S. Gerlach kaj Ronald P. Ely, Teaching and Media, Prentice Hall Inc., Inglewood Cliffs, New Jersey, 1980, p.354.
16. Norman M. Coble kaj James F. Porter, The changing role of the teacher, UNESCO, Paris, 1977.
17. Eric Hoyle kaj Jacquetta Megarry, Professional Development of Teachers, Kogan Page, London/Nichols Publishing Company, New York, 1980, p.284.
18. Handbook to the University of Oxford, Clarendon Press, 1963, p.288.
19. Terry Page kaj QuentinWhitlock, Educational Technology Twenty Years On, Kogan Page, London/Nichols Publishing Company, New York, 1979, p.182.
20. H.G. Haagmann, Zur Didaktik des Fernunterrichts, Stuttgart, Ernst Klett Verlag, 1970.

## Fakultativa Fremdlingva Instruado en Bulgario

(en la sepa klaso)

Laŭ la programo de la Ministerio pri Popola Klerigo en Bulgario por la sepa klaso de la Unueca Politeknika Lernejo (bulg. ESPU), aperinta en aparta libreto en 1979 kaj dissendita al ĉiuj lernejestroj, oni antaŭvidas po du instruhoroj semajne de fremdlingva instruado. En ĝi kiel fakultativa instruado estas indikitaj interalie jenaj studobjektoj: angla, franca, germana kaj rusa lingvoj. Pri la instruado de la rusa lingvo ni ne okupiĝos, ĉar ĝi ne estas instruata en tiu klaso kiel unua studjaro. Do ni trarigardos la programon de la fakultativa instruado de la angla, franca kaj germana lingvoj en sepa klaso de ESPU.

Por ĉiuj tri fremdaj lingvoj estas antaŭviditaj po 66 instruhoroj jare distribuitaj laŭ la instruplano jena:

<b>angla</b>	Enkondukaj lecionoj parolaj	6
	Enkondukaj lecionoj kun legado/skribado	8
	Nova lingva materialo	20
	Ekzercoj kaj konversacioj	25
	Ĝeneraligaj ripetaj lecionoj	3
	Finjara ripetado	4
	<b>Entute</b>	<b>66</b>
<b>franca</b>	Enkondukaj lecionoj parolaj	6
	Enkondukaj lecionoj kun legado/skribado	6
	Nova lingva materialo	16
	Ekzercoj (parolaj kaj skribaj)	33
	Ĝeneraligaj ripetaj lecionoj	5
	<b>Entute</b>	<b>66</b>
<b>germana</b>	Enkondukaj lecionoj parolaj	6
	Enkondukaj lecionoj kun legado/skribado	6
	Prilaborado de legaĵoj	17
	Gramatika materialo kun ekzercoj	13
	Ekzercado kaj ripetado	24
	<b>Entute</b>	<b>66</b>

Por ĉiuj fremdaj lingvoj estas notita leksiko ĉirkaŭ 250 novaj vortoj kaj esprimoj inkluzive la vortojn en la enkondukaj lecionoj.

La kapabloj pri parolo, legado kaj skribado efektiviĝas sur la bazo de jena tematiko:

1. Interkonatiĝo, familio (ang., fr., germ.).
2. Lernejo, klasĉambro, lernhelpiloj, leciono (ang., fr., germ.).
3. Hejmo, taga reĝimo, hejma laboro (ang., germ.).
4. Tempo, horloĝo, semajnaj tagoj, monatoj, sezonoj (ang., fr., germ.).
5. Festoj, naskiĝtago (ang., germ. + aĉetado).

Ni preterlasas la lingvan materialon (fonetiko, morfologio, sintakso) al la koncernaj lingvoj, sed ni volas atendi, ke en neniuj fremdlingva instruado en lernejo oni donas la tutan gramatikon dum la unua studjaro. Iuj aŭtoroj de lernolibroj por lernejoj tamen opinias, ke (ĉar la Esperanto-gramatiko estas facila!) oni rajtas doni la tutan Esperanto-gramatikon dum la unua studjaro.

Trastudinta la suprajn datojn por la fremdlingva instruado en la sepa klaso de ESPU en Bulgario ni\* proponas jenon:

<b>Esperanto</b> Enkondukaj lecionoj parolaj	4
Enkondukaj lecionoj kun legado/skribado	6
Nova lingva materialo	15
Parolaj kaj skribaj ekzercoj	32
Kuranta (6) kaj finjara (3) ripetado	9
<b>Entute</b>	<b>66</b>
Novaj vortoj kaj esprimoj: ĉirkaŭ 350.	

Ni proponas 100 vortojn pli kompare kun la aliaj fremdaj lingvoj, ĉar laŭ nia opinio la alproprigo de la Esperanto-leksiko estas pli facila ol de kiu ajn nacia lingvo. Krome iuj aŭtoroj asertas, ke nur la **NOVAJ VORTOJ** (sen la novaj esprimoj) devas esti **minimume 500!**\*\*

La kapabloj pri parolo, legado kaj skribado efektiviĝu sur la bazo de jena tematiko (kiun proponas al ni la unuaj dekkvar lecionoj de la nuntempe uzata lernolibro en la lernejoj):

1. Familio, interkonatiĝo.
2. Lernejo, klasĉambro, lernhelpiloj, leciono.
3. Hejmo, taga reĝimo, hejma laboro.
4. Tempo, horloĝo, semajnaj tagoj, monatoj, sezonoj.
5. Homa korpo, (mal)sano, sporto.
6. Aĉetado, korespondado, laborbrigado.

\* ni – t.e. Marin Bacev kaj Mihail Elenov (elstara lektoro de Esperanto).

\*\* Fakte en la nuntempe uzata lernolibro en la lernejoj (de aŭtoro triopo) estas notitaj pli ol 511 novaj vortoj (la nombro ne entenas la novajn vortojn donitajn por klarigi proverbojn aŭ gramatikajn regulojn).

Marin Bacev (metodikisto de Esperanto ĉe BEA)

Tamen evidentiĝas, ke ni devas proponi al la Ministerio pri Popola Klerigo la ellaboron de nova Programo pri Esperanto-instruado konsideratan kun la novaj postuloj de fremdlingva instruado kaj posta kompetentaj personoj ellaboru novajn lernolibrojn por la 1a kaj 2a (kaj eventuale por 3a) studjaro por la diversaj aĝgrupoj (ĝis 4a, 8a kaj 11a/12a klasoj).

## 9-a Internacia Printempa Semajno en Grésillon

3-a ĝis 9-a de aprilo

Malgraŭ malbela vetero, tiu semajno bone disvolviĝis dank'al riĉa programo kaj efika kunlaboro inter la gvidantoj kaj la partoprenantoj.

Tri kursoj okazis matene. La 8-10-jaraj infanoj parolis, gestis, desegnis, kantis kun Frédéric LE MAGADURE. La 11-15-jaraj infanoj laboris kun s-ino K. mie MARKARIAN kaj iniciatiĝis pri la kalkulo per sorobano, japana kalkulilo. La junuloj kaj plenkreskuloj, sub la gvidado de Raif MARKARIAN, ĉefe praktikis la lingvon traktante tre diversajn temojn: atletismo, la urboj Hennebont en Bretonio kaj Jimena de la Frontera en Andaluzio, Esperanto aŭ la angla kiel solvo de la lingva mondoproblemo, muziko, hejmedukado en Britujo anstataŭ lerneja...

Posttagmeze, la partoprenantoj laŭvice ĉeestis unu el la tri proponitaj aktivecoj: origami aŭ paperfaldado (K. Markarian), ornamado per fadenoj (M. Tabel), ludoj kaj teatraj improvizaĵoj (J. Goddard). Je la 17-a, preskaŭ ĉiuj retroviĝis por lerni britajn dancojn kun Raif Markarian.

Dum la vesperkunvenoj la gejunuloj prezentis kvazaŭajn televido-elsendojn: ĵurnalistoj donis informojn pri la ĵus pasinta tago, akceptis invititojn kaj prezentis la diversajn programerojn: kantojn, dancojn, skeĉojn.

Ankaŭ la vizito al kaprinbredejo kaj fromaĝfarejo estis okazo por raporto.

La junaj artistoj disponis pri tabulo por afiŝi siajn verkojn, ĉef humuraĵojn; kelkaj el ĉi tiuj estis elektitaj por la staĝgazeto.

Dum la lasta vesperkunveno, inter la diversaj eroj, Michel AUDIBERT ludis „La Advokato”-n kaj je la fino de la vespero legis la poemon de Pierre SELOS „La voix des enfants”. Tiam la gvidanto de la semajno prononcis kelkajn konkludajn kaj dankajn vortojn, kaj kiel eĥon al la poemu diris la jenon: „En la nuna mondo, kie okazas tiom da militoj, kie oni tiel facile torturas kaj murdas homojn, nia semajno estas modelo de kunvivado, modelo de internacia kunlaborado kaj internacia kompreniĝo.”

Frédéric LE MAGADURE  
Prezidanto de la Grupo de  
Esperantistaj Edukistoj  
franca sekcio de ILEI

## SEKCIESTROJ DE LA LIGO

- Aŭstralujo: Annie Spencer, 323 Belmont Rd., Tingalpa. Q-4173.  
Aŭstrujo: Mag. Karl Hirmann (estro de SAEI - Societo de Aŭstria Esperanto - Instruistoj) Rannachstr. 3 A - 8046 GRAZ.  
Belgujo: E. Van Damme, Albert-I-straat 44, B-1750 Schepdaal.  
E. Symoens, Putsesteenweg 131 A, B-2180 Kalmthout.  
M. Sondervorst, Rue du téléphone 1, B-2180 Mettel.  
H. Lentzen, Feldweg 20, B-4701 Kettenes.  
Brazilo: Elvira Fontes, C.P. 5888, São Paulo.  
Britujo: Hilary Chapman, 34 Llwin Deganwy Conwy Gwinedd LL312RA  
Bulgarujo: Marin Bacev Postakesto 1054 - 50F10  
Danujo: Lis Thune, Bremsbärvänet 15, DK-2650 Hvidovre.  
Finujo: Pentti Jarvinen, Lähdekorvenk 4, SF-33820 Tampere 82.  
Francujo: Frédéric Le Magadure, 23 rue Jules Ferry, F-56700 Hennebont.  
F R Germanujo: Ruff Karin, Pappelweg 22, D-315 Peine.  
Grekujo: K. Koliopoulos, Plateia Pagratiou 5, strato Pyrou 28, Ateno (506).  
Hispanujo: Francisko Zaragoza Ruiz, Coll. Nacional, Callosa de Segura, Alicante.  
Hungarujo: Zuzsa Barcsay, Ben Kp. 25/b, H-1011 Budapest.  
Irano: M. Saghafian Apt 7 N. 34 24<sup>th</sup> Street. Kuj Nasr Avenue Teheran 14488  
Islando: Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170 Reykjavik.  
Israelo: D-ro Josef Murfan . p.o.k. 1289 IL 61012 TEL. AVIV.  
Italujo: Catina Dazzini, C.P. 22, I-54100 Massa, pĉk 11244548.  
Japanujo: Fusakugu Kido, Gamon Higashi 6-51, Kosigaja Saitama 343.  
Jugoslavujo: Miodgrad Stojanović, Omladinakih Brigada 49/III/31, YU-11070 Novi Beograd.  
Luksemburgo: Robert Hoener, 4 rue des Charbons, Esch sur Alzette.  
Malto: Carmel Mallia, 89 Sanctuary str., Zabbar, Malta.  
Nederlando: D. Luesken-Burger, Boerhavestraat 82, NL-7316 LH Apeldoorn.  
Nordameriko: John H. Fulton, 33365 Avenue F, Yucaipa, CA-92399 USA.  
Norvegujo: Eling Strand, Ekebergveien 208, Leilighet 154, Oslo 11.  
Nov-Zelando: Gvenda Sutton, 21 Rama Crescent, Wellington 4.  
Polujo: Stefania Pakalska, Marszalkowska 53, m. 50, PL-00-676 Warszawa.  
Portugalo: Antonio Manuel Correia Coimbra, Rua Coronel Leitao 20, 1º Esq. Lisboa Marques.  
Sanmarino: Marina Michelotti, via 25 marzo, 73, I-43031 Repubblica di San Marino.  
Sovetujo: Johannes Palu, Sõlme 21, SU-200016 Tallinn, Eesti NSV.  
Nikolaj Starodubcev, Poštrestante SU-3-340047 Doneck.  
Sud-Afriko: Axel von Blotnitz, Marcolaan 8, 1710 Florida Glen.  
Sudakorevjo: SO GIL SU - Sdemun P.K 59 - Seŭlo 120  
Svedujo: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-24200 Hörby.  
Venezuelo: Esteban E. Mosonyi, Apartado 61500, Chacao, Caracas.

## Izolitaj Membroj

- Ĉeĥoslovakujo: Karel Kraft, Zupanovice 49, CS-26214 Hřímeždice Okr. Píbram.  
Ĉinujo: Lu Chien-Bo, Szechuan Universitato, Chengdu, Szechuan.  
Germana D R: Till Dahlenburg str. d. DSF 13 DDR-2722 Brühl.  
Kubo: Pedro Pablo Lamas Diaz, Apartado 223, Ciego de Avila.  
Malagasujo: Eugene Raveloson, B.P. 1663-101, Antananarivo.  
Singapuro: Hongi Liao, apt blk. 14, 2809 H, Eunos Crescent, Singapuro 14.  
Zairujo: Antoine-Samuel Ngangu, B P 13, Lukala, Nkandu.

## Estraro de ILEI

Prezidanto: rektoro Helmut Sonnabend, Pappelweg 22A, D-315 Peine, F R Germanujo.  
Vicprezidanto: Anica Hurčak, Polic-Kamova 91/III, YU-51000, Rijeka, Jugoslavio.  
Sekretario: d-ro prof. Mario Dazzini, Casella Postale 22, I-54100 Massa, Italujo.  
Vicsekretario: prof. Francisko Zaragoza Ruiz, Colegio Nacional, Callosa de Segura, Alicante, Hispanujo.  
Financoj: Bertil Andreasson, Södra Rörum pl 455, S-24200 Hörby, Svedujo.

## Kunlaborantaj Organizo

EEC: Eŭropa Esperanto-Centro, Rue Montoyer 37, bte 24, B-1040 Brussel (Belgio).  
Konstanta reprezentanto de ILEI ĉe E.E.C.:  
S-ino Elfriede Ernst, 154 Bld. de Smet de Naeyer bte 7, B-1090 Brussel.  
FIMEM: Fédération Internationale de Mouvements d'Ecole Moderne, 42 Grande Rue, F-92310 Sevres.  
SAT: Sennacieca Asocio Tutmonda, 67 Avenue Gambetta, F-75020 Paris.  
UEA: Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam.  
UNESKO: Eduka, Scienca kaj Kultura Organizo de Unuiĝintaj Nacioj, 7 Place Fontenoy, F-75007 Paris.  
Konstanta Reprezentanto de ILEI ĉe Unesko:  
Prof. James Fairbank, 6 Avenue Théodore Rousseau, F- 75016 Paris (tf. 6479187).

## INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO — IPR

en rilatoj de reciproka informado kun Unesko, Kategorio C

Aperas trifoje jare

redaktas: Helmut Sonnabend, Pappelweg 22A, D-315 Peine,  
FR Germanujo

Membreco en I.L.E.I. (30 svedaj Kronoj jare) inkluzivas la ricevon de IPR.

abonprezo por nemembroj: 30 svedaj kronoj (inkluzivas afrankon kaj aeroŝton)

Kontoj:

1. poŝtĝirkonto: 682117-7 (Stockholm). La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj - ILEI . Södra Rörum pl. 455. S- 242 00-Hörby. (Svedujo)
2. poŝtĝirkonto: 3789 64 — I.L.E.I. 2814 —  
UEA NL Rotterdam 3007 — Nieuwe Binnenweg 176.

manuskriptojn sendu duoble (skribmaŝine) al la redaktoro